ESPERANTO-ASOCIO EN ĈSR
Praha II, Malá Ŝtěpánská 7
Telef. 330-14

Julio 1952

INFORMA CIRKULERO n-ro 2.

## Esperanto en nia lando

Malgraŭ malcerteco de nia organiza situacio estas esperantista vivo inter ĉeĥoslovakaj samideanoj rimarkinde vigla.

Eĉ dum la jaro 1952 daŭras ilia kunlaborado en internacia gazetaro. La du noveloj de Fr. Omelka aperintaj en "Esperanto" aperos libroforme. Dro Pumpr estis petita sendi sian tradukon de "Bapto de Sankta Vladimiro" por publikigo en eksterlando. Rakonto de prof. Urban aperis en "Esperanto". En Heroldo aperis versoj de E. Urbanová. Ankaŭ tie aperis traduko el K. Ĉapek, subskribita pseŭdonime, kaj slogano de J. Kořínek. En La Laborista Esperantisto aperis pluraj artikoloj pri aktualaĵoj en Ĉeĥoslovakio. En "Esperanto" ni legis ilustritan artikolon pri Bohemia vitro. En Plzeň aperis jam 6 numeroj de ciklostilita "Pacbatalanto", dediĉinta sian atenton al la pacbatalado, organizata de progresemaj homoj en la tuta mondo sub gvido de Soveta Unio; eldonas ĝin Esp-ista Rondeto ĉe Kleriga Kunularo kaj redaktas ĝin k-do R. Burda. Sed plej ampleksa estas daŭra fluo de korespondaĵoj alvenantaj ĉiutage el Ĉeĥoslovakio en la tutan mondon, en kiuj ni, ĉeĥoslovakaj esperantistoj, klarigas ĉeĥoslovakajn vidmanierojn kaj spertojn de nia vojo al socialismo. Tia laboro estas laŭ nia firma konvinko la plej efika metodo en batalo por la tutmonda paco.

Ĉiuj niaj lokaj grupoj jam eniĝis kiel esperantistaj rondetoj aŭ E-sekcioj en amasorganizojn, plej ofte en Kulturklubojn de Revolucia Sindikata Movada (ROH) aŭ en Klerigajn Kunularojn (O.B.) Ie ili liveras tre altkvalitan laboron. Tiuj en Brno, Hradec Králové, Olomouc, Ostrava, Praha dissendas ciklostilitajn bultenojn aŭ programojn.
Krom tiuj ĉi rondetoj ekzistas 42 Esperanto-interesrondetoj ĉe lokaj grupoj de Ĉeĥoslovaka Asocio Junulara (ĈSM). Multaj el ili tre viglas. Ili korespondas kaj aranĝas renkontiĝojn reciproke. La plej memorinda el tiaj renkontiĝoj estis Tutlanda konferenco de Esperantista Junularo en Pardubice la 2-an de marto 1952. Ĉeestis 80 delegitoj el multaj lokoj de Ĉeĥoslovakio.. En České Budějovice okazis la 17.-18.VI. Regiona konferenco de E-Junularo. En ambaŭ estis reprezentita nia Centra Komitato (vicprez. R.Hromada kaj V.Vyhlídka). Ĉiuj junularaj grupoj aranĝas kursojn, pluraj el ili havas proprajn kunvenejojn (en Praha XII, Římská 35 du ĉambrojn tre taŭge ekipitajn). Pluraj el ili aperigas ciklostilitajn cirkulerojn (Ĉ.Budějovice, Praha, Opava, Gottwaldov, Lanŝkroun, Poprad-Svit). En Ĉ.Budějovice oni decidis organizi konkurson pri scio de la lingvo.
Nia INTERVENA KOMISIONO (R.Burda, J.Friedrich, O.Sklenčka, T.Balda) estis akceptita en la ministerio de Interno la 22-an de majo. Prezentitaj argumentoj kaj dokumentoj prokrastigis decidon, kiu minacis fariĝi negativa. Tamen ni klopodas konvinki decidajn aŭtoritatojn, ke sole nescianto povas prezenti tendecojn de nia movado kiel kosmopolitismajn. Bazo de nia esperantismo depost ĝia komenco estas internaciismo, kiu volas helpi ankaŭ al malgrandaj nacioj evolui siajn kapablecojn kulturajn kaj senigi sin de imperialistaj subpremoj. La granda plimulto de esperantistoj sciis aŭ sentis, ke la nacia subpremo havas siajn kondiĉon kaj kaŭzon en subpremo ekonomia, ke liberiĝo nacia okazas paralele kun liberiĝo ekonomia.

Ĝi vivas. Tiu aserto ne estas konsolo sed konstato de faktoj. Ni resumu kelkajn.

UEA dum nuna malfacila situacio internacia, kiam ne eblas el multaj landoj transsendi monon en fremdlandon, altigis la kotizojn por reveni al nivelo de prezoj el 1920. Kaj tamen la membronombro ne malkresis laŭ ciferoj el majo 1952.

Regule aperas "Scienca Revuo". Ĝiaj 40-paĝaj kajeroj multe superas laŭkvalite antaŭmilitan Bultenon de Internacia Scienca Asocio Esperantista koncerne temojn, stilon kaj lingvan kvaliton.

Zorgo, kiun dediĉas esperantistoj al sia lingvo, estas multe pli granda kaj multe pli scienca kompare kun la situacio pasinta. Jam la fakto, ke aperis jam tri kajeroj de "Esperantologio" kaj ke aperas jam la 13-a jarkolekto de la nederlanda "La Progresanto" pruvas, kiom intense dediĉas sin esperantistoj al kulturado de sia lingvaĵo.

Manko de ĉiaspeca fanatismo. Legante la nuntempan esperantistan gazetaron vi spertas ofte modelan respekton al opinio de kontraŭulo. "Malgranda Revuo" eldonata kaj redaktata de Stellan Engholm en Svedujo povas esti nomita kiel ekzemplo de tia respektemo al raciaj rezonadoj; kvankam ĝi neniam estis senpartia.

Internaciismo, ne kosmopolitismo, tio ŝajnas esti konvinko de plej multaj verkantoj kaj organizantoj esperantistaj.

Ni citu tie ĉi difinon de kosmopolitismo, kiun donas rusa "Mallonga Filozofia Vortaro", aperinta sub redakto de M. Rozental kaj J. Judin en 1951. Ĝi difinas jene:

"K o s m o p o l i t i s m o, reakcia teorio, predikanta indiferentecon en rilato al hejmo, al patrujo, al naciaj tradicioj, al nacia kulturo. Kosmopolitismo estas dorsflanko de nacionalismo; tial ankaŭ ĝi estas same kiel nacionalismo ideologio kaj politiko de burĝaro".

I n t e r n a c i i s m o p r o l e t a estas en la sama aŭtoritata verko difinita jene: "Ideologio kaj politiko de interpopola kaj internacia solidareco de laboristoj kaj de ĉiuj laborantoj. Ideo de proletara internaciismo estis unuan fojon starigita kaj teorie ellaborita de Marks kaj Engels."

Legante atente esperantlingvan literaturon kaj gazetaron ni ĉiam trovas, ke kosmopolitismaj vidmanieroj estas malofte trovataj, sed ke granda plimulto de aŭtoroj pensas laŭ vidmanieroj internaciismaj.

Eĉ kiam iu volis argumenti por -i- finaĵo de landnomoj por kosmopolitismaj asertoj, la plej granda esperantista poeto Koloman Kalocsay refutis akre en Literatura Mondo 1947 tiun manieron de argumentado, kvankam li mem konsentis kun uzado de -i-.

Efektive: legante la esperantistan gazetaron ni ne estas en societo kosmopolitista. Ili estas en granda plimulto internacianoj en la plej klara senco de la vorto. Kaj kiam ni denove havos eblecon kontakti pli intense kun ili, multaj el ni povos enporti en tiun ideologion de internacio la progresemajn elementojn de internaciismo proletara.

-----

ZAMENHOF-PORTRETO.

Ornamo de ĉiu esperantista kunvenejo. La librovendejo de EAĈSR povas liveri fotografaĵon 24x30 cm afrankite por Kčs 60.--, en kadro kun vitro por Kčs 220.--.

-----

## Bovino helpas komprenigi la situacion

Anoj de la Intervena Komisiono, kiuj laŭinvite vizitis diversajn instancojn, renkontis virojn atente aŭskultantajn niajn dirojn. Ni sukcesis multon klarigi kaj montri abundan dokumentan materialon pri la laboro farita. Ni rimarkis, ke oni kolektis sendepende de ni informojn pri la problemo diskutata. Nia afero estis pritraktata laŭ jena skemo:

Esperanto kiel lingvo kaj E-ideologio.
Esperanto kiel faktoro en servo de informado pri ĈSR kaj en la batalo porpaca.
Esperanto en Sovetunio.
Nia Asocio.
Pri la esperantistoj ĝenerale.

Siatempe la Intervena Komisiono certe donos detalan raporton pri la tuta laboro, eble al jarkunveno de la Asocio. Dume vi povas helpi ĝian laboron, donante klaran informon pri la situacio de Esperanto en Sovetunio. Ni bezonas nek supozojn, nek hipotezojn, nek proprajn opiniojn. Ni devas havi faktojn, pruveblajn faktojn favorajn aŭ malfavorajn. Se iu el vi scias ion, skribu tuj al ni.

Enkondukante la unuan cirkuleron, ni klare montris la vojon irotan. Ni ne scias, ĉu niaj esperantistoj akceptis nian instruon kaj ekagis laŭ ĝi. Aŭdiĝis vortoj de malkonsento. Mi citu unu el ili: Dum la jarkunveno de EK Praha diris en sia parolado la prezidanto jenajn saĝajn vortojn: "Se vi volas melki la bovinon, vi devas ĝin nutri!" Opinio certe logika, sed ... la decidpovaj instancoj ne estas ankoraŭ konvinkitaj pri tio, -

ke la lakto (peresperanta laboro) estus direktota por bono de la ĝenerale gravaj celoj,
ke la bovino (Esperanto) ne produktas krom la utila laboro ankoraŭ alian produkton, kies malutilo superus la utilecon de la lakto,
ke la posedantoj de la bovino (la esperantistoj) estus vere kaj daŭre pretaj liveradi nur kaj nur la utilegan lakton.

Male, la decidpovaj instancoj opinias, ke memstara bovinejo (la Asocio) ne estas necesa kaj se la bovino estos konservata, ke ĝi povas esti flegata en alia stalo - kaj ĝin ni serĉas.

Jen, karaj kamaradoj, tia estas la situacio. Ni povus daŭrigi kun multaj "se" - sed ĉu tio estus interesa nun, kiam estas pesataj niaj agoj, kiuj ne ĉiam estis tute prudentaj ?

La fina decido ankoraŭ ne estis farita. Do, ni esperu !

Skl.

-----

Novaj ESPERANTO-GLUMARKOJ de EAĈSR. Trikoloraj, desegno de Bartošík. Folio kun 50 ekz. (5 diversaj desegnoj) Kčs 11.-- afrankite. Liveras Librovendejo de EAĈSR. Mendu tuj !

neniam estis teda legaĵo por tiu, kiu laboras aŭ iam laboris en sia loko. Tial ni ankaŭ en tiu ĉi cirkulero redonas koncizajn informojn pri loka agado. Ni tre petas ĉiujn aktivulojn raporti al ni pri siaj klopodadoj kaj rezultoj.

B r n o. La regulaj kunvenoj kun efektive altnivelaj programoj ĉiumarde en hotelo Passage (Lidická 23) daŭras. La 8.VI. okazis regiona kunveno gvidata de ro-po J. Friedrich dum ĉeesto de Asociaj vicprezidantoj Hromada kaj Kamarýt. La saman tagon je la 14-a horo okazis ekzameno de 11 p. La sabaton antaŭ la konferenco la gekursanoj de s-ino V. Borská aktoris kun sia instruistino en tre bela teatra vespero.

D ě č í n. La rondeto aranĝis la 3.VI. prelegon de V. Růžička pri Ĉinio kaj bakteria milito en Koreio - por lokaj kaj lernejinfanoj. La prelego estis ripetata la 6.VI. en kulturdomo por fervojistoj.

H r a d e c K r á l o v é. Post la jam tradicia Josefa Vespero la 15.III. okazis dimanĉon antaŭtagmeze en la kulturĉambro stacidoma Regiona kunveno, kiun partoprenis s-oj el 20 lokoj. Ĉeestis vicprez. Asociaj Hromada kaj Kamarýt, la kunvenon gvidis ro-po Frant. Pytloun. Kiel distriktaj del. estis elektitaj: A. Ŝedá (Rychnov n. Kn.), J. Bureš (Nové Město n. Met.), J. Kodýtek (Krčín), J. Doležal (Petrovice), H. Bártl (Nová Paka), B. Munzar (Hořice v P.). La 16.-23.III. estis en stacidoma atendejo E-ekspozicio, inaŭgurita de R. Hromada. Grandaj afiŝoj kaj stacidoma disaŭdigo invitadis al vizito. Venis tien 2300 homoj el 440 lokoj. - E-Seminario okazis la 11.V., 25.V. kaj 8.VI. je la 10-12 horo kun jenaj prelegoj: Rimarkindaĵoj el E-gramatiko (R.Hromada), Historio de la ideo de L.I. (Dro Aug. Pitlík), E. en servoj de la Popoldemokratia respubliko (prof. Miloš Lukáš).

M l a d á B o l e s l a v. Fabrika E-Rondeto en AZNP reaktiviĝis kaj deklarante malaprobon de kospopolitismo fiksis sian planon por majo-decembro. Precipe grava estas en la plano oktobro, kiu metas kiel devontigon: Perado de korespondado inter niaj pioniroj kaj tiuj de Sovetio, Bulgario, Rumanio, Pollando, Hungario kaj Germana Demokratia Respubliko.

N á c h o d. En majo estis fondita E-Rondeto ĉe grupo de ROH. Prez. Jaroslav Novák, Padolí 297, sekret. Ivan Krouský, ulice L.Janáčka 802, kas. Sláva Chlumová. Kunvenoj ĉiumarde. Dek tri viglaj esperantistoj, lernintoj de kurso, kiun gvidis de oktobro 1951 ĝis marto 1952 Suchardová kaj Doležal el Týniště n.Orl. kaj kiun vizitis 20 personoj. Nun daŭras nova kurso por komenc., en kiu instruas 14 anojn J. Bureš. La grupo invitas al aliĝo esp-istojn el Náchod kaj ĉirkaŭaĵo kaj deziras ekrilati kun aliaj E-grupoj en la respubliko.

O s t r a v a - Z á b ř e h. La 11.V. estis inaŭgurita en Retter-parko monumento por honorigi la 360-an naskiĝtagon de Jan Amos Komenský. La monumento estis instalita pro iniciato kaj helpo de Kleriga Kunularo-Esperantista sekcio Komenský. La inaŭguran procesion partoprenis 300 p., gvidis ĝin fondinto de la E-societo Frant. Sedláček, nun 72-jara, la solenon inaŭguris Frant. Lička. En la nomo de la urbestro parolis Mach kaj Dluhoš. La orkestro ludis himnojn ĉeĥoslovakan, esperantistan, sovetian. La saman tagon posttagmeze okazis Regiona konferenco, kiun partoprenis 80 p.

O l o m o u c. La E-seminario estis finita la 6.VI., partoprenintoj estis ĉirkaŭ 40-50. - Regiona laborkonferenco la 30.III. aprobis provizoran regionan komitaton de EAĈSR, konsistantan el 5 komitatanoj de la E-Rondeto de la Distrikta Kleriga Kunularo. La solena kunveno la 15.V. rememorigis la 5-an Ĉeĥoslovakan Esperanto-Kongreson, okazintan antaŭ 20 jaroj en Olomouc. Dum tiu kongreso estis en la urba parko plantita E-arbo, inaŭgurita E-monumento kaj apuda strato nomita Zamenhof-strato. - Printempa kurso de la distrikta Kleriga Kunularo finiĝis en aprilo. Tuj komenciĝis nova kurso kun 12 p., gvidas ĝin ree s-ino Jarmarová.

P l z e ň. La 21.V. okazis en la membra kunveno lumbildparolado pri Ĉinio kaj la bakteria milito en Koreio. La parolado estis ripetita la 23.V. por la tajlorkooperativo kaj 22.V. por la laborantoj en la urbodomo, sume por 235 p. Dum Majo infanoj de la Rondeto sendis 54 leterojn al eksterlandaj infanoj, aktivaj membroj pli ol 100 leterojn. - Estis senditaj salutleteroj de Uzina Konsilantaro en Plzeňaj bierfabrikoj kaj de E-Rondeto ĉe la Urba Kleriga Klubo al Brita Packonferenco. - Ĉe inaŭguro de ekspozicio pri la klasbatalo parolis 1.VI. R. Burda pri Ĉinio kaj bakteria milito en Koreio. - Okaze de la Infantago estis instalita en montra fenestro de la regiona sekretariejo de EAĈSR ekspozicio de infanleteroj, desegnaĵoj kaj fotoj, ricevitaj el eksterlando.

P r a h a. La E.K. en sia jarkunveno la 6.IV. eniĝis en Klerigan Kunularon Praha 2. Ĉeestis la kunvenon reprezentanto de la Kleriga Kunularo, kiu promesis por venonta aŭtuno ankoraŭ pli intensan helpon en propagando al kursoj, kiuj estas la plej sukcesantaj kursoj inter ĝia kursaro. La 23.VI. estis dum Zamenhof-memorfesto prezentita en la muzika kaj deklama programo unuaktaĵo "Granda Ludo", sendita al la Klubo de Julio Baghy. La programaj kunvenoj okazas regule ĉiumerkrede en Praha II, Štěpánská 3 en restoracio Šumava.

R y c h n o v  n. K n. La 1.VI. finiĝis kurso kaj E-Rondeto instaliĝis en propra ejo sur la urba placo. Tie okazis ekspozicio la 1.-8.VI. Sabaton la 30.V. kursfina festo kun bona programo, kie laŭ invito de la Rondeto parolis R. Hromada.

T ř i n e c  kaj  Ĉ a n t o r i a. La tradicia ĉiujara ekskurso sur la monton Ĉantoria okazis dimanĉe la 22.VI. kaj ĝuis ĉijare belegan veteron. Partoprenis 60 p. el 14 lokoj (el Třinec 16, el Ostrava 15, el Olomouc 6). En la monta restoracio okazis Regiona kunveno, kiun gvidis Vlad. Slaný, reg. peranto kaj dum kiu raportis Rud. Hromada. Sabate vespere okazis amika kunveno (100 p.), dum kiu por neesperantistoj parolis pri nia afero R. Hromada. Junularo de Třinec kantis, recitis. Blahut preparis scenon "Kvin minutoj" de Kökényi el Literatura Mondo. Preparojn gvidis Anna Milatová.

V e s e l i  n. M. La Rondeto kunvenas ĉiumerkrede por duhora Esperanta diskutado ka raportado pri impreson el esp. korespondado.

--O--O--

Librovendejo de EAĈSR povas nun eĉ krandkvante liveri:

| | |
|---|---|
| Velká slovenská učebnica esperanta de J.V.Dolinský | 67.50 |
| Esperanto v 14 úlohách de E.V.Tvarožek | 32.50 |
| Malý slovník esper.-slovenský a slovensko-esper. de J.V.Dolinský | 62.50 |

Slovakaj studhelpiloj, bone uzeblaj ankaŭ por Ĉeĥoj.

---------------

LITERATURA MONDO, jarkolektoj 35 kaj 36 serĉataj,
proponojn sendu al EAĈSR - - -

– O - O - O -

Someraj Esperanto-kursoj 1952,
detalojn vidu sur pĝ. 8.

La eldonanto de tiu revuo, s-o Teo Jung, disponigis al ni senpage certan nombron da abonoj depost la nro 4-a por transdono al aktivaj grupoj kaj unuopuloj. Ni ekspedas Heroldon ankaŭ al samideanoj, por kiuj pagis la abonon iliaj eksterlandaj amikoj.

Ni dividis la Heroldon tiel, ke laŭeble en ĉiu loko, kie montriĝas iom vigla Esperanto-aktiveco, estu atingebla tiu ĉi interesa revuo. Sube ni donas liston de tiuj lokoj. Du grupoj, tiu en Žilina kaj Záv. klub Vítkovických železáren en Ostrava ne akceptis nian proponon.

Al s-o Teo Jung apartenas varma danko de ni ĉiuj pro la neforgesota amika faro.

----

A) Nun ni notas la lokojn, kie niaj membroj povas legi Heroldon kaj ni indikas, kie ĝi estas trovebla: B r n o - Osvět. beseda: Vondroušek, Záv. klub První Brn. stroj.: Balaš, Junularo: Chlubnová, B ř e c l a v - ER: Trojna, Ĉ e s k á S k a l i c e - Esp.krouž.při Osvět. besedě, Ĉ e s k é B u d ě j o v i c e - Záv.klub pošt.zam.: Hofhansel, D ě č í n - Záv.klub ĈSD, D o k s y - EK: Tyle, G o t t w a l d o v XI - Otrokovice - Záv.klub Svit, H á j u Opavy - Záv.klub Brán. žel.: Sichová, H r a d e c K r á l o v é - Záv.klub ĈSD: Dolanský, C h e b - Záv.klub Stavomat, C h r a s t a v a - Junularo: Mlejnek, J a b l o n e c n.Nisou - EK: Mai, Junularo: Jíra, J i h l a v a - EK: Tichý, K a r l. Vary - Záv. klub ĈSD: Tichota, K a r v i n á - Sdruž.kom.podn.: Havlík, Záv.klub při dole 1.máje: Havllík, K l a d n o - Osvět.bes. kaj ZKSO: Vlčková, K o l í n - EK: Janda, K o p ř i v n i c e - Záv.klub Tatra: Zanáška, K o š i c e - SES: Kremer, K r o m ě ř í ž - Junularo: Suchánek, L a n š k r o u n - Osvět.bes. kaj Junularo: Ŝtěpánek, L i b e r e c - Záv. klub ĈSD: Fanta, L i p t. S v. M i k u l á š - SES: Hofmann, L i t v í n o v - EK: Pastor, M a r. L á z n ě - EK: Kaplánek, M a r t i n - SES: Izák, M l. B o l e s l a v - Záv.klub ASAP: Toman, M o d ř a n y - EK: Zedník, M o s t - Záv.klub Výtopna ĈSD: Lüftnerová, N o v ý B o r - EK: Majer, N ý ř a n y - EK: Pecháčková, O l o m o u c: Esp. Societo, O p a v a - Osvět.beseda: Kuzník, O s t r a v a - Záv.klub železničářů: Kaminský, Osvětová beseda, EK Ostrava II: Janouš, Záv. klub hl. nádraží, Záv.klub Sl.lihovarů: Staňura, Junularo: Neuwirth, P a r d u b i c e - Záv.klub ĈSD: Franc, P í s e k - EK: Křivánek, P l z e ň - EK: Reiser, P o p r a d - SES: Zvara, P r a h a - Osvět.beseda, Junularo: Vyhlídka, Skoltoj: Lešinger, P ř e d m o s t í u Přerova - Junularo: Kropáč, P ř í b o r - EK: Sattek, R o k y c a n y - EK, R y c h n o v n.Kn.- Osvět.beseda: Suchomelová, S t r a k o n i c e - Osvět.beseda: Blažek, Záv.klub Vln.záv.: Koral, T á b o r - EK: Jokl, T a n v a l d - Osvět.beseda: Belda, T r e n č í n - Záv.klub Merina: Lamačka, T r u t n o v - EK: Sedláček, T ř e b í č - Osvět. beseda: Sittauer, T ř i n e c - Záv.klub želez... Molotova, U h. H r a d i š t ě - EK: Vilémová, Ú p i c e - EK: Šír, Ú s t í n.Labem - EK: Drunecký, V e s e l í n.Moravou - EK: Hynšt, V s e t í n - Záv.klub Zbrojovka: Zajíc

B) Krom tio ricevas Heroldon aktivuloj en jenaj lokoj: Bratislava, Brno, Bystřice p. Host., Havl. Brod, Hliník, p. Pezinok, K. Vary, Kutná Hora, Kyjovice, Lipt. Ondrašová, Martin, Náklo, Nelahozeves, Nové Mesto n. Váh., Olomouc, Ostrava, Praha, Stráž n. Nisou, Svitavy, Ústí n.L., Šumbark, okr. Ostravas, V. Hamry.

C) Kaj fine ni ekspedas senkoste Heroldon al samideanoj, por kiuj estis pagita la abono el eksterlando. Ili estas en jenaj lokoj: Běhánky, Bratislava, Brno, Břeclav, Dubnica n. Váhom, Ĉ. Budějovice, Litomyšl, Neratovice, Nová Ves, p. Pacov, N. Hrádek n.Met., Olomouc, Praha, Ropice okr. Ĉ. Těšín, Skalice okr. N.Bor, Stonava, Třebíč, Veselí n.Mor., Zlonice, Zruč n. Sáz., Žďár n.Sáz.

---

De la ricevantoj sub A) kaj B) ni postulas 60 Kčs por kovro de elspezoj. Estas tamen ankoraŭ iuj, kiuj ne pagis tiun sumeton. Ili bonvolu tion fari tuj aŭ resendu la jam ricevitajn numerojn, por ke ni povu ilin disponigi al alia loko.

Korespondante pri heroldo kun ni, ĉiam aldonu respondan afrankon!

## Korespondi deziras

f-ino V i e r n e, 44, Place de la Gare, A l è s (Gard), Francio, kun student/in/o proksimume 20-jara, kiu kolektas pm. kaj pk.

H e r i a u, 29, rue de la Grande Serme, Montreau-les-Mines (Saône et Loire), Francio, kun studento, laŭeble juristo,

f-ino H o r t a l a, 23, rue de Marseille, Lyon 7-e, Francio, kun esperantist/in/o ĉirkaŭ 25-jara,

f-ino Baud, poste restante, C r a p e n n e (Rhône), Francio, eksinstruistino, sole kun absolute spertaj esperantistoj

M a g e, 3, rue Jean-Baptiste Say, L y o n 1-er, Francio, sekretario, sole kun spertaj esperantistoj Ĉeĥoslov.

Tonka Ĉ a k a r o v a, Struma 18, B u r g a s, Bulgario

Katia D. P e t k o v a, Kliment Oĥridski 55, B u r g a s

C a n t o n, 5, rue de Pau, T a r b e s (Htes Pnées), Francio, 15-jara studento intŝ. pk. kun samaĝul/in/o

Stefan N. B o ĵ k o v, Debelec- T i r n o v o, Bulgario, junulo

Jisataka H a y a ŝ i, Koyama-Niŝi-Oono-Cho 50, Kamikyo, K y o t o, Japanio

Taisei N a r i t a, Siĉiku, Seinan-Cho, 57, Kamikyo, K y o t o, Japanio

f-ino Hisako K a w a m u r a, Yamaŝiro Kottogako, Gimnazia Esperantista Grupo, Hanazono-Badai-Cho 3, Ukyo, K y o t o, Japanio

f-ino Hiroko K a g a w a, sama adreso kiel f-ino Hisako Kawamura

Akira M u r a k a m i, Siĉiku, Simo Sibamoto-Cho 67, Kamikyo, K y o t o, Japanio

--------

Portu ESPERANTO-INSIGNON ! Prezo Kčs 12.-- afr. Mendu tuj!

## IV. letní kursy esperanta v Rožnově p. Radh. 12.-26.VII.1952

Svaz esperantistů ČSR, kraj Ostrava, pod záštitou MNV v Rožnově p.Radh. za spolupráce skupiny Ostrava-Junularo pořádají v klimatických lázních Rožnově p.R. tyto kursy esperanta:
A) pro začátečníky, B) pro pokročilé, C) přípravný kurs pro kandidáty na učitele esperanta.
Dopoledne vyučování, odpoledne koupání a výlety, večer záb. program.
Adresa: Marie Skařupová, pošt.přihr. VŽKG, Ostrava 10

---

## Letní kolej esperanta v Doksech u Máchova jezera 27.VII.-9.VIII.1952

pořádá Újezdní osvětová beseda v Doksech. Kursy:
Základní, podle přímé methody Cseh - pokračovací - konversační - řečnický - seminář o gramatických problémech esperanta, překladatelském umění, o esperantské literatuře a hnutí.

Umělecká akademie, letní karneval, koncert, benátská noc na jezeře a výlety. Kolejné s ubytováním a stravným Kčs 1795,--. Sleva na dráze 50%. O prospekty a přihlášky pište ihned na : A.Ŝpůr, disp. OSAZ, Doksy u Máchova jezera.

---

## Letní kolej esperanta v Popradě - Vysoké Tatry 10.VIII.-23.VIII.1952

Za spolupráce Osvětové besedy v Popradě pořádá komitét Letní koleje v Doksech. Program této koleje je podobný programu v Doksech, je však postaráno o krásné výlety do Vysokých Tater.
Podrobný prospekt dodá rovněž: V. Ŝpůr, disp. OSAZ, Doksy u Mách.jez.

---

## Esperantista vivo

Ni ne povas en nia informilo - kiun ni je nia sincera bedaŭro ne povas eldoni sufiĉe ofte - raporti detale pri okazintaĵoj en nia verda familio. Tamen ni ne povas ne enskribi la du sekvantajn menciojn:

Rudolf B u r d a k v i n d e k j a r a. Li naskiĝis la 9-an de aprilo 1902. Multjara esperantisto li precipe post la liberiĝo fariĝis grava laboranto en Plzeň. Li dediĉis sin al la laboro inter klaskonsciaj laboristoj. Batalo por socialismo kaj Esperanto estas ĉe li kunligita en strebado al pli bona farto de la homa gento laŭ instruoj de marksismo-leninismo. Malnova komunisto li travivis la militon en koncentrejo. Revenis ne rompita kaj dediĉis sin precipe al serĉado de kunlaborantoj inter progresemaj japanoj kaj ĉinoj. Rezultatoj akiritaj de li en tiu ĉi agadsfero multe helpas nun al ni por konvinki la decidajn aŭtoritatojn pri nia ĝusta sinteno en nuntempa situacio ekonomia kaj politika.
Josef P e c h s e p d e k j a r a. Li naskiĝis en Plzeň kaj aktivis tie dum 40 jaroj kiel esperantisto en la laborista E-movado kaj turismo.

Li entreprenis helpe de Esperanto multajn vojaĝojn, prelegis pri ili en multaj lokoj kaj verkis pri ili en ĉeĥaj kaj fremdaj gazetoj.

Ambaŭ jubileuloj estu salutitaj amike kaj varme !

---

ESPERANTOLOGIO
Internacia revuo por la lingvistiko kaj bibliografio de Esperanto
Redaktas dro P. Neergaard, Kopenhago.
La unua volumo ampleksas 250-300 paĝojn kaj aperos en 4 kajeroj.
La unuaj 3 kajeroj jam aperis kaj estas rapide livereblaj, la 4-a post apero. Kosto de la volumo 450 Kčs.
Kelkaj ekzempleroj nun haveblaj. Interesuloj turnu sin tuj al la librovendejo de EAĈSR

---

Librovendejo de EAĈSR ofertas

| | |
|---|---|
| Helpiloj por studo: | Kčs |
| Lad. Krajíc: Učebné texty pro kursy (2.50) liverebla en septembro | 20.-- |
| J.V.Dolinský: Velká slovenská učebnica medzin. řeči esperanto (2.50) | 65.-- |
| E.V.Tvarožek: Esperanto v 14 úlohách (pro Slováky) (2.50) | 30.-- |
| Dr. St. Kamarýt: Ellerni 1-12 | 10.-- |
| E.E.Collinson: Esperanto a jeho kritikové | 2.-- |
| Dr. St. Kamarýt - Dr. T.Pumpr: O zkouškách z esperanta | 10.-- |
| Esperantologio, internacia revuo por la lingvistiko | 450.-- |
| Vortaroj: | |
| J.V.Dolinský: Malý slovník esper.-slovenský a slov.-esper. (2.50) | 60.-- |
| J. a K.Filipové: Velký slovník česko-esperantský (11.--) | 390.-- |
| Wörterbuch-Bausteine | 2.-- |
| J. Mařík: Novtempaj vortoj en Esperanto | 2.-- |
| R. Hromada: Malý slovníček česko-esperantský | 10.-- |
| Diversaĵoj: | |
| M.Majerová: Urbo sub signo de fajro (2.50) | 30.-- |
| J. a K.Filipové: Kantareto (2.50) | 45.-- |
| Teksto de kantoj kaj oper-arioj (Brno) | 6.- |
| Vendita fianĉino (multobligita teksto) (2.50) | 10.- |
| Kelkaj jarkolektoj de "La Progreso" (4.--) broŝuritaj po | 50.-- |
| Kelkaj jarkolektoj de "Ligilo" en kajeroj (4.--) po | 40.-- |
| A. Staňura: propono de stenografio | 3.-- |
| Dr. S. Kamarýt: O jednoznačnosti mravního soudu | 15.-- |
| O. Ginz: Esperanto na poštovních ceninách | 1.-- |
| Lerneja reformo en Ĉeĥoslovakio - senpage | -- |
| Olomouc - bela gvidlibreto kun aldonita E-teksto (1.50) | 30.-- |
| Propaganda materialo: | |
| Aliĝilo al Esperanto-kurso 100 ekz. (4.--) | 35.- |
| Atesto pri kursfina ekzameno | 4.- |
| Propaganda afiŝeto multkolora 1.50 aŭ | 3.- |
| Kartona afiŝeto (1.50) | 5.- |
| Propaganda afiŝo 41x30 cm - kun libera spaco por anonco de kurso, prelego ktp. | 2.- |
| Lada tabulo dukolora, uzebla ankaŭ por klubejo ktp. (6.--) | 100.- |
| La sama, iomete difektita (6.--) | 50.-- |
| Geografia karto de ĈSR sur duobla poŝtkarto - kun teksto pri naturbelaĵoj de ĈSR 10 ekz. (1.50) | 20.-- |
| La sama geografia karto kun kantotekstoj 10 ekz. (1.50) | 20.-- |

Skribmaterialo:

| | |
|---|---|
| Leterpapero kun koverto - 10 ekz. (1.50) | 10.-- |
| Aerpoŝta leterpapero kun koverto - 10 ekz. (1.50) | 15.-- |
| Poŝtkarto - 10 ekz. | 5.-- |
| Poŝtkarto kun portreto de Zamenhof (Bartošík) | 1.-- |
| Novjara poŝtkarto de Bartošík | 1.-- |
| Toyen: Printempa saluto | 1.20 |
| Slovakaj popolkantoj sur bildkarto, serio de 4 kartoj | 11.-- |
| Oficialaj ĉs .poŝtkartoj kun Esp.-teksto: Ostrava, Doksy, Martin po | 3.-- |
| Glumarkoj: Trikoloraj de Bartošík 5 div. desegnoj - 50 ekz. | 10.-- |
| Esperanto - řeč zítřka - 10 ekz. | 3.50 |
| Insigno: Verda stelo sur blanka fono (afrankite) | 12.-- |
| Emajlita ŝildeto: ESPERANTO PAROLATA 14x5 cm (4.--) | 30.-- |

Al la prezo aldonu afrankon, notitan inter krampoj.
Kiam ne estas notite, tiam minimume 1 kronon.

---

EL POPOLA ĈINIO - diversaj n-roj - po Kčs 5.--
ESPERANTO-SERVO - diversaj n-roj - senpage
Mendu ĉe EAĈSR

---

Atenton!

Pro libertempo estos la Asocia oficejo en Praha II, M. Štěpánská 7 fermita de 21.VII. ĝis 20.VIII.1952

---

Sole en plej urĝaj aferoj turnu vin al O. Ginz, Nad cementárnou 10, Praha - Podolí, telef. 912-02

---

poŝtmarko
ČESKOSLOVENSKO
1 Kčs

ŝtampaĵo
TISKOPIS

Titl
Ginz Oto
Nad cementárnou 10
Praha-Podolí

I N V I T O

Praha 27.8.1952

al la informa komitata kunveno de EAĈSR, kiu okazos ĵaŭdon la 4-an de septembro je la 19.30 horo en la Asocia oficejo Praha II, Malá Štěpánská 7.

Via ĉeesto urĝa.

Salutas vin

Esperanto Asocio en ĈSR
A. Malík - prezidanto

P O Z V Á N Í

Praha 27.8.1952

na mimořádnou schůzi výboru Svazu esperantistů ČSR a zástupců odboček Svazu, dosud nezačleněných do některé z masových organisací nebo Osvětových besed, která se koná v sobotu dne 6. září 1952 o 19. hodině v klubovně Klubu esperantistů v Praze, Praha II, Štěpánská 3, rest. "U Šumavy".

PROGRAM:

1. Zpráva o dosavadní činnosti intervenční komise, zvolené dne 2.XII.1951 na pracovní konferenci zástupců Svazu ve Slovanském domě.
2. Návrh na dobrovolné rozejití Svazu esperantistů ČSR.
3. Usnesení o spolkovém majetku Svazu a odboček.
4. Volba likvidační komise.

Svaz esperantistů ČSR
A. Malík - předseda